

La etapoj de la svisa federalismo, IV.
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 513, 1981.09.10 & 12

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Fine de la dekoka jarcento francaj armeoj invadis la teritorion de la Svisa Konfederacio kaj la francaj okupantoj trudis al la svisoj ilian unuan konstitucion. La Helveta Respubliko havis tre mallongan vivon de nur kvin jaroj, ĉar la kantonoj ne agnoskis ĝin. La Helveta Registaro devis lukti kontraŭ ribeloj, kiujn la francaj armeoj provis ĉesigi bruligante la vilaĝojn kaj mortigante ties loĝantojn. Estas tiam, ke Heinrich Pestalozzi, protestanto el Zürich, iris al Stans por okupiĝi pri centoj da georfoj, kiujn li edukis en ilia katolika fido. Tiu leciono de religia toleremo estis aŭdata.

A.- Napoleono en Paciga Akto redonis al Svislando konfederacian karakteron. Je la fino de lia regno oni revenis al la malnovaj kutimoj, sed tamen neniu proponis al la ekskoloniaj teritorioj, kiuj fariĝis kantonoj, reakiri la kolonian statuson. La reprezentantoj de la malnovaj kantonoj devis akcepti kunsidi en la Dieto kun la ambasadoroj de la novaj kantonoj.

Cl.- Ĉiuj sentis la neceson revizii la pakton. Sed tiu revizio ne povis progresi, ĉar la ambasadoroj de la kantonoj ricevis la ordonon defendi la absolutan aŭtonomecon de la kantonoj. Tiama karikaturisto montras, kiel energie laboras tiuj ambasadoroj. Ili provas plenigi grandan filtrilon per akvo, kiu tuj forfluas.

A.- Pro la malforto de la Dieta povo, formiĝis aparta Katolika Ligo, kiu grupigis la katolikajn kantonojn por rezisti al la novaj ideoj, kies portanto estis la radikala partio.

Cl.- Fakte la situacio fariĝis tre grava. Oni troviĝis antaŭ secesio kaj civila milito. En 1847 la Dieto decidis la malfondon de la aparta katolika ligo kaj rapidan revizion de la pakto. Ĝi elektis la ĝenevanon Henri Dufour generalon de la federacia armeo. Tiu armeo ricevis la malfacilan taskon obeigi la registarojn de la katolikaj kantonoj, evitante sangoverŝadon.

A.- Fakte ekzistis du svisaj patriotismoj. Tiu de la aparta ligo katolika, kies armeo ankaŭ promesis fidelecon antaŭ la svisa flago. La alia patriotismo estis tutsvisa, kaj ĝi celis la starigon de federacia reĝimo, kie la katolikoj povu kunvivi kun la protestantoj.

Cl.- La milito kontraŭ la katolika armeo kaŭzis fakte cent kvar mortigojn. Post kelktaga rezistado la katolikaj kantonoj rezignis pri sia aparta ligo.

A.- Tiu grava krizo konvinkis ĉiujn, ke alvenis la momento, por la kantonoj, cedi parton de la propra suvereneco profite al la kreo de tutsvisa registaro. La 22-an de septembro 1848 okazis la lasta kunsido de la malnova Dieto. Ĝi voĉdonis favore al la nova konstitucio, kiu estis redaktita en kelkaj semajnoj.

C1.- Sufiĉis jura reformo por krei pacajn rilatojn inter la militintoj. Tuj ĉesis la religiaj kvereloj. Formiĝis politikaj partioj, kiuj, jam du jarojn post la militaj eventoj, povis organizi la saman tagon kaj en la sama vilaĝo politikan kunsidon, sen ke naskiĝu konflikto inter la kunvenantoj de malsamaj partioj. La disputkaŭzojn malaperigis jura ŝanĝo kaj paca kunvivado montriĝis tre facila.

A.- La konstitucia reformo, sur kiu baziĝis la konstruo de la Helveta Federacio, ne detruis tion, kio ekzistis. La Dieto fariĝis la Inter-kantona Konsilantaro kaj ricevis la nomon de Konsilantaro de la ŝtatoj. Oni eĉ ne tuŝis al la statuso de la kantonaj kaj duonkantonaj, kvankam ĉiuj estas same aŭtonomaj ŝtatoj. Oni kreis duan decidpovan ĉambron, kiu reprezentis la kantonajn popolojn. Ĝi ricevis la nomon de Nacia Konsilantaro. La kunigo de ambaŭ decidpovaj konsilantaroj formas la Federacian Asembleon. Estas ĝi, kiu elektas la Federacian Registaron, kiu ricevis la nomon de Federacia Konsilantaro. Ĝi ankaŭ elektas la juĝistojn, kiuj formas la Federacian Tribunalon.

C1.- Oni tre precize limigis la povon de la Federacia Registaro, kiu pli similas al Administra Konsilantaro, ol al Ministraro, kaj la kantonaj registaroj restis tre potencaj. Apartenas al la Federacia Registaro la fakoj ekstera politiko, armeo, dogano, mono kaj poŝtoj. Por eviti, ke la Federacia Registaro akiru tro da potenco, oni limigis la tempon de ĝia prezidado al unu jaro, kaj la armeo ricevas ĝeneralon nur se estas militdanĝero. Ankaŭ oni evitis koncentri ĉiujn federaciajn aktivecojn en la sama urbo. Berno estis elektita kiel federacia ĉefurbo, sed la sidejo de la Federacia Tribunalo troviĝas en Lausanne kaj tiu de la Asekura Tribunalon en Lucerno.

A.- La jura reformo celis pli la komercan modernigon de la lando, ol la politikan. La samon oni rimarkas en la nuna Eŭropo. La unuiĝoj celas precizajn ekonomiajn punktojn, kaj oni alpaŝas al politikaj reformoj, nur se ili montriĝas absolute necesaj por la plenumado de la antaŭviditaj ekonomiaj reformoj.

Cl.- Tre verŝajne Eŭropo tre trankvile marŝas al federacia integriĝo, sed malgraŭ la malpacienco de la eŭropaj federalistoj, tiu ĉi evoluo estos tre malrapida. La studo de la formiĝo de federacioj, kiel la svisa aŭ la usona, malkovrigas fundamentajn principojn, kiujn en nia rapida priskribo de la disvolviĝo de la svisa federalismo ni provis reliefigi.

A.- La historio de la svisa federalismo instruas, ke submetiĝo al arbitracio estas absolute necesa, por ebligi pacan kunvivadon inter aŭtonomaj ŝtatoj.

Cl.- Kunvivado estas ebla, se la ŝtatoj akceptas krome la principon de la egaleco de la neegalululoj. La grandaj ŝtatoj ĉiam malfacile akceptas, ke malgrandaj ŝtatoj estu iliaj egalululoj.

A.- Alia principo estas la respekto de la minoritatoj ĉiaspecaj, la flego de la diversecoj. Respekti kutimojn, kiuj ŝajnas al ni retrogradaj, religion, kiu estas en opozicio kun niaj profundaj vivprincipoj, kaj politikajn idealojn, kiuj minacas la niajn, tio ne estas facila afero. Oni tendencas interveni en la vivon de la ceteraj ŝtatoj, ĉu por evoluigi ilin, ĉu per sendado de misiistoj aŭ per subvencio de politikaj agadoj. En federacio oni devas kultivi sintenon de objektiva neŭtraleco rilate al la vivo en la ceteraj ŝtatoj.

C1.- Tio havas psikologian avantaĝon, ke la rigardoj sin turnas al la federaciaj instancoj. Nur pere de ŝanĝoj je la federacia nivelo oni povas favori kunordigitan evoluon en la diversaj membro-ŝtatoj de la federacio.

A.- Fakte federalismo estas kontraŭstaro al la naturaj determinismoj, kiuj volas ke la plej potencaj trudu perforte sian volon al la ceteraj. Solidareco, toleremo, neŭtraleco ne estas naturaj refleksoj. Tamen kunvivado en federacio estas ebla, nur se la kultivado de tiuj viv-idealaj fariĝis realaĵo. Pro tio la federacia konduto ne estas eksportebla. Kaj pro tio ĝi tiom profunde markas ties praktikantojn. Tion ĉi ni havas la okazon konstati, en elsendoj, kiujn ni dediĉas al la praktiko de la labor-paco, kiu karakterizas la rilatojn inter la laboristoj kaj

labordonantoj en la Helveta Fderacio. Tiu ĉi labor-paco estas siamaniere kontraŭstaro al natura determinismo, kiu ricevis la nomon de klasbatalo.

C1.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée Gacond konkludis raporton pri la etapoj de la svisa federalismo. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*